

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 linoj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 28. Melburno (Melbourne), Australio. 10 Oktobro, 1922.

SCHOOL CHILDREN WISH TO LEARN ESPERANTO.

A well-organised campaign among the school children of Dresden has resulted in 1200 boys and girls between the ages of 11 and 13 being taught Esperanto in 36 classes in the various elementary schools of that city. The parents have to pay a moderate fee, but it is hoped that eventually the teachers' salaries will be paid by the school authorities.

ALBANIA TO TEACH ESPERANTO IN SCHOOLS.

The Government of Albania has officially informed Dr. Privat, President of the recent conference held in Geneva concerning the teaching of Esperanto in public schools, that the Ministry has decided to make Esperanto a compulsory subject in all second grade, upper and commercial schools.

CONGRESS REPORTS.

The proceedings of the Finland Congress were very fully reported in the daily papers, especially Uusi Suomi and Hufvudstadsbladet, which each devoted several columns daily to the Congress reports in the Finnish language, and also reported in Esperanto the addresses by Professor Setälä and Professor M. Soininen, a former member of the Finnish Ministry, who addressed the Congress at the instance

of the present Minister of Education. Each day's programme appeared in these papers in Esperanto. Two of the weekly magazines that have reached us contain articles in Esperanto, and in one of them every article in the issue has the title both in Finnish and Esperanto.

THE XIVTH. WORLD CONGRESS OF ESPERANTISTS.

The Committee of the Congress at Helsingfors issued members' tickets to 1039 persons from 32 countries, about 900 of whom were in attendance when the Congress was opened by S-ro. V. Loimaranta, Minister of Education for Finland. Speaking in the Finnish language, he welcomed the visitors to the Congress, and concluded his remarks by a few sentences in Esperanto. S-ro. K. von. Frenckell was elected President, and S-ro. A. Sandström and Dr. E. Privat, Vice-presidents.

On taking the chair, S-ro. von Frenckell thanked the local congress committee for their painstaking and satisfactory work in preparation for the Congress. He also thanked S-ro. Stahlberg, President of the Republic of Finland. He saluted Sinjorino Zamenhof, and thanked her for participating in the Congress.

Professor Dr. Emil N. Setälä then read a paper on the problem of World Language. After pointing out that scientists must have access to the

literature, not only of the great cultured nations, but of many others, and that in one short life, which should be devoted entirely to the service of science, it was necessary for the purposes of many sciences to devote much time to the study of language, he remarked that even then much valuable information would remain unavailable owing to linguistic difficulties. Thus the need of a common language for science was always urgently before us. After analysing the claims of existing languages—especially English—Professor Setälä showed that the world language must of necessity be what has wrongly been described as an artificial language, for if any existing national language were chosen, the very fact that people of the whole world would use it would soon cause it to lose that which had made it characteristic of the nation whose language it was. Every national language should be spared the mutilation it would undergo if it were to be used by all nations which knew it only imperfectly, and whose manners of thought were totally different from those of the people whose mother tongue it was. National languages should be spared as the sacred property of the nation. As an international help language, one should select a language freely imitating the national languages, but not so closely that its use would in any way injure them. Professor Setälä concluded by saying: "By that I do not mean to say that an international help language so constructed would not, in the hands of an expert endowed with the linguistic sense, become a means for the expression of the beauty of human thought in a setting of verbal beauty, and so vibrate the chords of the human heart. That is essentially outside the primary aim of an international help language: it is something which will result automatically when the situation arises."

The President thanked the Professor, and said that the speech of so famous a scientist and philologist gave us valuable arguments to combat any still existing doubts regarding an "artificial language."

D-ro. Kolomano de Kalocsay then declaimed the following "Kongresa Runo," a poem specially composed by him for the occasion:—

KONGRESA RUNO.

Vokas voĉ' de Vainamoinen,
Vibras vok' en vaga vento
Kaj ĝin muĝas malproksimaj
Montoj, maroj murmurantaj.

La potenca praa patro
De la kantoj karesantaj,
La bravulo kun la brila
Balaanta blanka barbo
Kaj ĉe l' koro kun kantelo
Kies kordoj sorĉe sonas,
Ravon semas en la sinoj:
Vainamoinen vekiĝinta
Vigle, veke, varbe vokas,
Logas li al land' de l' lagoj
Kun la filoj festi frate.

Vibras voĉ' en vaga vento:
Sonĝis mi en sankta sino
De Suomi kaj ripozis
En la revoj, rememoroj
De la idoj inspiritaj.
Sed min vekis vok' de l' tempo.
Min el muska tero tiris
Sorĉaj sonoj sonorantaj.

Miri venis mi miraklon:
Patrolingvon de la Mondo:
Lingvon, kiu liutsone,
Lule ludas sur la lipoj,
Flate, flustre, flirte flugas.
Dolĉon donas dorlotante,
Muĝas, kiel mar' majesta,
Kun titana tono tondras:
Ideala inda ilo,
Instrumento konkuranta
Kun la kordoj de kantelo.

Miri venis mi miraklon,
Fablan forton fepotencan,
Kiu tegas tutan teron
Kaj por arda amo armas,
El la disaj, dividitaj
Gentaj grupoj glore formas,
Fandas fratan familion,
Ravan rondon sub radioj
De l' eterna esperstelo.
Ege ehu elementoj,
Resonadu regionoj
Vekan, varban, vokan, voĉon
De la nobla nova sento!

Helpi venis mi heroojn,
Helpi homojn hederindajn
En la brava batalado
Por la bono, por la beno
De la mondo baraktanta.
Kantu, kordoj de kantelo
Ilin inde invitante

Al la kampoj kalevidaj.
 Am-armeo! Amasiĝu!
 Armu vin per arda amo!
 Festu frate kun la filoj
 Kaj sen laco laboradu!
 Luktu firme, forte, fajre
 Kaj sufoke kaptu kole
 Tiun urson ulnounge,
 Monstron de la Mortolando:
 La militon malicegan.
 Kreu kuna konstruado
 Novan, sanktan, savan Sampon
 Mir—miraklan muelilon
 Por mueli la malamom
 Mondon monstre mordadantan.
 Fine idoj inspiritaj,
 Kiel iam Ilmarinen,
 Forŝu firman firmamenton
 Kun ĉielaj ĉiuj ĉarmoj
 Dian pompan mondpalacon:
 Pian pacon paradizan
 Kun la dolĉaj didonacoj
 De la fabla feliĉego.

Al la land de l' mil' da lagoj,
 Muskaj montoj murmurantaj
 Vetflugante kun la vento
 Vokis voĉ' de Vainamoinen.

In thanking the author, the President remarked that it would be no longer possible to say that Esperanto was not a fitting vehicle for poetic expression.

Then followed a speech by Dr. E. Privat, who said that Finland was the first State in which our movement had received official attention from a Parliament. He reviewed various criticisms of Esperanto, such as the assertion that the movement aimed at destroying national culture and at causing disunion between language and country, and showed that these criticisms were those of misinformed or maliciously-inclined opponents. He defined Esperanto culture as culture based on respect and love of the different nations, and based on reciprocal brotherhood.

Among the telegrams wishing the Congress success was one from the New Guinea group at Rabaul.

It was then announced that official delegates were in attendance representing the International Labour Office, Geneva; International Red Cross, Geneva; Union of International Asso-

ciations, Brussels; the Ministers of Public Instruction for Bulgaria, Czechoslovakia, Estonia, Spain, Holland, and Lithuania; the Minister for Internal Affairs, Germany; Chief Inspector of Railways, Russia; Government of Uruguay; Town of Milan, and the Fairs of Finland, Frankfurt, Leipzig and Prague.

LA JARA KUNVENO DE LA A.E.A.

Ĉi tiu kunveno okazis en la kunvenejo de la Melburna sekcio de la Asocio, vendredon, 29 de septembro.

Prezidis S-ro. A. R. Cohen, la vicprezidanto, kiu diris, ke por la unua fojo depost la starigo de la asocio forestas ia propono por fari ŝanĝon en la konstitucio. Dum la jaro multaj novaj anoj aliĝis kaj la nombro de personoj kiuj interesiĝas en Esperanto daŭras grandiĝi.

La Sekretario legis la raporton, kiu montris, ke en la pasintaj dekdu monatoj gratulindaj rezultatoj estas atingitaj. Nun ekzistas deziro ĉe ĉiu sekcio de nia loĝantaro, speciale instruistoj, aŭdi faktojn pri Esperanto. Pli ol 50 ŝtataj instruistoj nun studas la lingvon, kaj iuj instruas memvolajn lernantojn. La Asocio klopodis, ĉe la Universitato por la esploro de Esperanto kiel dua lingvo egale kun aliaj, en la ekzamenoj por eniri en la ŝtatan servon, sed ĝis nun nenio estis farita.

La vendo de libroj superis tiunde la antaŭa jaro, kaj indikas ke multaj samideanoj tiel bone posedas la lingvon, ke ili ŝatas legi la verkojn trovatajn en nia konstante kreskiĝanta literaturo.

Kvankam la procedoj estis atente aŭskultataj, ili ne vekis ian entuziasmon, sed tiu povas esti pro la foresto de io diskutebla kaj pro plena kontento kun aferoj tiaj, kiaj ili nun estas.

SENKULPIGO.

Burĝo estis malkontenta pri la decidoj de la vilaĝa konsilantaro kaj indigne diris: La duono el la konsilantaro estas azenoj. Devigite tion repreni, li faris tion jenforme: Mi bedaŭras mian riproĉon kaj deklaras, ke la duono el la konsilantaro ne estas azenoj.

LA PERLOJ DE FINNLANDO.

La fantomo de la lastjara kongresa ekskurso svebis antaŭ niaj okuloj, kiam ni invitis nin al la vojaĝo al Imatra. Lastjare ja multajn ĉagrenigis, ke la ekskurso daŭris unu tagon kaj nokton, kaj oni moke diris, ke la finnaj samideanoj espereble ne faros ekskurson al la norda poluso, kaj jen oni anoncis al ni ekskurson, kiu postulas eĉ du dumnoktajn vojaĝojn.

Kaj tamen estis pli, ol cent kuraĝaj partoprenintoj, kiuj forlasis en du grupoj Helsinki sabate vespere. Nun, reveninte ni povas konfesi, ke malgraŭ la por kelkaj neoportuna dormado aŭ eĉ maldormado dum la vojaĝo, la ekskurso estos por ni neforgesebla travivaĵo kaj ni povas nur ŝojegi, ke ni povis propraokule rigardi la perlojn de Suomi.

Jam la urbeto Viipuri kun la malnova kastelo, kun la ronda turo kaj kun la multaj malnovaj lignaj kaj same multaj modernaj ŝtonaj domoj donis rekompencon por la tro frua leviĝo, dum la vagonaro haltis en ĝia moderna stacio. La bona organizo de la finnlanda movado montriĝas, ĉar en ĉiuj, stacidomoj ni vidis la afiŝon pri la delegito de UEA kaj pri la kongreso.

Por entuziasmaj esperantistoj ne ekzistas malbona vetero. Kvankam preskaŭ konstante pluvus dum la ekskurso post nia alveno, ni povis admirati la finnajn pejzaĝojn kaj ekkoni la misteran internon de tiu antaŭe nur en nia imago vivanta lando.

Ni estus povintaj dum horoj stari aŭ sidi ĉe la rifuoj kaj ŝtonegoj apud kaj inter kiuj trabruegis muĝeganta, kvazaŭ boleganta, saŭmanta kaj ondiga fluego de Imatra kaj Vallinkoski kaj rigardi la akvoamason bruegantan kaj zumegantan. Ŝajnis al ni, kvazaŭ misteraj subteraj fortoj volus ĉielen ĵeti milionojn da perlojn kaj ia sorĉa mano vaporigas ilin kaj reĵetas en la profundon, por ke ili pluen ondu, klopodu kaj suprenintencu, ĝis ĉiuj atingas sian celon: kiel vaporo, forflugi al la ĉielo. Aŭ estus ribelantaj animoj, kiuj batalis unu kontraŭ la alia kaj frakasas la aliajn neniiĝante samtempe ofte eĉ sin mem. Jen en profundo ĉiam ŝaŭmis blanke, kvazaŭ blanka lafo bolus tien kaj dezirus eksplodi aŭ kvazaŭ ia sorĉistino kuirus tie

en nevideblaj kaldronoj ian misteran fluidaĵon, kiu eble la eternan vivon donos, kiel eterne leviĝas samloke la vaporoj, la gutoj kaj la ondlangoj, lavante unu la alian kaj levante alten la naŝantaj stipojn kaj trunkojn aŭ ĵetante ilin al la pordo sub eterne verdaj pinoj. Jen amasego sieĝis remparon de rifstonego, kiu senvorte, skeptike aŭ malamike kontraŭstaras kaj eble ne sentas, ke la bruegaj akvopafoj tamen fine distordas, forpulas ĝin, ke ĝi tamen devas cedi kaj doni lokon, por ke la amasego diversa sed unucela atingu la vojon al la lago, kie renkontiĝas ĉiuj akvoj el ĉiuj regionoj por jam milde susurante frate kune plaŭdeti kaj forgesi, ke ili kunvenis el diversaj regionoj.

Per aŭtomobiloj dum kelkaj horoj ĉiuj ekskursantoj povis viziti la imponan akvofalon de Vallinkoski kaj post mallonga fervoja vojaĝo ni pasigis kelkajn belajn horojn sur la lago de Saima, kiun ni traveturis per komforta ŝipo kaj la ofte rakontita finna lago kun centoj de verdaj insuloj fabelaj pretersvebis antaŭ niaj okuloj. La pluveto ofte eĉ ŝajnis, kvazaŭ la jam aludita fekurteno, tra kiu ni rigardas belajojn por la aliaj homoj nevideblajn kaj mirindajn.

Alveninte en urbeton malgrandan sed ŝajne karakterize finnan, do ankaŭ ekkonindan, ni baldaŭ povis reiri en la samaj vagonoj, kiuj jam portis nin al Imatra kaj post nokta vojaĝo ni atingis nian hejmurbon Helsinki. Aŭ pardonu, Helsinki ja ne estas nia hejmurbo, kaj kiam ni plenaj da impresoj majestaj kaj kun ĝojo surpasis la pavimon de nia kongresurbo, kun malserena vizaĝo ni konstatis, ke la sonĝo alvenas al la fino kaj ni devas disiri por daŭrigi la seriozan laboron.

Sed la akvofluoj majestaj ankaŭ nur tion pruvis, ke la forta volo, la organizita amaso kaj la klopodo al la supro, eĉ se nur per longa, batalplena vojo, tamen atingas la celon kaj eĉ dumvoje suprenĵetas perlojn brilantajn. Kaj la perloj de nia movado eĉ restas por ni kaj ne malaperas, kiel la akvogutoj de Imatra.

PAULO BALKANYI
el Budapest, Hungarlando.

(La supra artikolo aperis en "Uusi Suomi" finna tagĵurnalo, je 15 aŭgusto, la oka tago de la Kongreso.—Red.)

KRONIKO.

WHANGAREI, Nov-Zelando. — La grupo konstante progresas. S-ro. P. Whittle, nun loĝas en Cambridge. Li estas tre agema kaj propagandema, tiel oni esperas ke nova grupo nov-zelanda baldaŭ aperos. Lastatempe S-ro W. H. King gajnis la B.E.A. Diplomon, kiel ankaŭ S-ro. Roderick Ross, el Palmerston N.

WILLIAMSTOWN, V. — S-ro. G. Redfern parolis antaŭ la "Presbyterian Ladies' Guild." Ĉirkaŭ 20 ĉeestis. La paroĥestro, post la parolo diris, ke li estas tre kontenta aŭdi pri Esperanto kaj mem decidis studi ĝin.

MORELAND, V.—Dum konveno de la loka filio de la A.N.A., S-ro. Redfern menciis Esperanton. La 26 membroj ĉeestantaj estis tre entuziasmaj. Ili aĉetis 30 malgrandajn lernolibrojn.

NORTHCOLE, V.—Ĉi tiu grupo senĉese kreskas. Laŭ la programo, kiun oni aranĝis por la venontaj tri monatoj la membroj faros grandon progreson se ili regule ĉeestos kaj partoprenos en la aranĝitaj ekzercoj.

FINNAJ KANTOJ.

La gazeto Ilkka publikigis kelkajn tradukojn de finnaj kantoj kiel saluton al eksterlandaj gastoj. Inter ili estis la subaj:—

KANTO DE SUOMI.

(Suomen laulu.)

Aŭdu sorĉe kanto sonas
muskaj montoj vortojn donas:
jen la Suomi-kant'!

Aŭdu, zumas floraj valoj,
bruas pinoj, akvofaloj:
jen la Suomi-kant'!

Cie ĉio sonas kante,
alvokante, allogante:
jen la Suomi-kant'!

Frato, se vi koron havas,
kiun la beleco ravas,
jen la Suomi-kant'!

FINNA POPOLA KANTETO.

(Yksi ruusu).

Unu rozo kreskadis en verda val'
kaj bele briletis en sun',
aliris vagulo kaj vidis ĝin,
kaj forgesi ne povas nun.
Volontege li estus rompinta ĝin
alpremonte al sia kor',
sed ne havis kuraĝon la malriĉul';
li ĝin lasis kaj iris for.

Trad. G. J. RAMSTEDT.

LABOUR AND ESPERANTO.

La Sennacieca Revuo, kiu nun prezigas 5000 ekzemplerojn, en artikolo el Usono, diris, inter alia,—Ankaŭ Geo. Williams revenis el Moskvo, eldoninte pamfleton kontraŭ la bolŝevika registaro. . . . Nur unu por ni jam esperantistigitaj laboristoj interesa afero troviĝas, en lia pamfleto la jena: li ĉeestis la trian Internacion kaj plendis pri la malbonaj tradukaĵoj el la diversaj lingvoj en la anglan! Li konstatas ke la tradukistino el la rusa lingvo sciis la anglan malpli bone ol Nov-Jorka knabineto el fremdlando, loĝanta tie ĉi ses monatojn! Li diras ke nur lingvosciistoj . . . povis bone kompreni la decidojn kaj celojn de la kunvenintoj. Sed nek anglo nek franco zorgas multe pri alia lingvo. Post tiaj gravaj kaj justaj plendoj pri tiu ĉi afero, li tute forgesas solvi la problemon laŭ nia vidpunkto, ĉar nenie en sia libreto li mencias, ke per Esperanto, angla kaj franca laboristo povas tre bone interparoladi kaj pridiskutadi la plej gravajn aferojn por la laborista klaso.

RECENZOJ.

BES-a ADRESARO de Esperantistoj el ĉiuj landoj. Kvara eldono, jaro 1922/23. Eldonis Bohema Esperanto-Servo en Moravany (Ĉsl). 74 pĝ. Prezo: 1,50 sv. fk., por malbonvalutaj landoj 0,75 sv. fk.

Ĉi tiu estas la kvara jara apero de tiu ĉi libreto. Ĉiu ekzemplero enhavas kuponon, per kiu la aĉetintoj povas fari malgrandajn aĉetojn en Moravany. (C.W.B.).

LA PAGIO DE L'REĜINO. De Eugen Heltai kaj Emil Makai. Tradukis D-ro. Koloman de Kalocsay. El la hungara literaturo. 31 pĝ. Havebla ĉe P. Balkanyi, Budapest VI, Hajos utca 15.—Prezo: 1 resp. kup. aŭ egalvaloro, kvar ekz. por 1 sv. fk., por orienteŭropanoj 7 gmk.

Ĉi tiu komedio estis ludita dum la postkongreso, 1921, en Budapeŝto. La nomo de la tradukinto certigas, ke la teatraĵeto estas tre bonstile tradukita. La roloj estas por tri viroj kaj du virinoj. (C.W.B.).

La Plej granda komunista organizaĵo en la mondo. Biblioteko de Teristo. No. 3. Plena priskribo de la duhobora komunumo. La komunuma sistemo ne estas tre alloga al la plejmulto. (C.W.B.).

A TRANSLATION EXERCISE.

Readers are invited to send us translations of the following piece before the 30th November. The one that the Editor deems to be the best will be published in the December "Suda Krucio."

For about an hour nothing was uttered but words which are almost an equivalent to nothing. The gentleman had not yet spoken; the ladies, with loud vociferations, seemed to talk much without thinking at all. The gentleman, with all the male stupidity of silent recollection, without saying a single syllable, seemed to be acting over the pantomime of thought. I cannot say indeed that his countenance so much belied his understanding as to express anything. No, let me not do him that injustice; he might have sat for a picture of Insensibility. I endured his taciturnity, thinking that the longer he was in collecting, adjusting and arranging his ideas, the more would he charm me with the tide of his oratorical eloquence when the materials of his conversation were ready for display. But alas it never occurred to me that I have seen an empty bottle corked as well as a full one. At length the imprisoned powers of eloquence burst through, and he remarked with equal acuteness of wit, novelty of invention, and depth of penetration, that we had had no summer. Then, shocked at his own loquacity, he double-locked the door of his lips.

FLUIDIGO KAJ FANDADO DE BAZALTO.

Bazalto (bluŝtono) estas admirinda konstrumaterialo, sed la kosto de ĝia prilaboro kelkfoje faras ĝian uzon senprofitita. Tiel la anonco, ke D-ro. Ribbe, el Avergne, Francujo, sukcesis fluidigi kaj fandi ĉi tiun rokon ne estas de malgranda intereso, tio estas, se

tiuj procedoj estos sufiĉe malmultekostaj por fari ilin komerce profitdonaj, ĉar kompreneble per sufiĉo de hejto bazalto ĉiam estas fluidigebla. Detaloj pri la procedo de D-ro. Bibbe estos atendataj kun intereso. Oni povas rememori, ke bluŝtona "lano," produktata de ŝpruĝiganta bazalton fluidigitan sub forta premado, estas fabrikata en Melburno depost kelkaj jaroj. Oni diras, ke ĝi estas admirinda materialo por hejtizoligo. Rilate al fluidigita ŝtono estas eble interesa rememori la fakton, ke kvarco estas fluidigebla kaj eltirebla en fadenojn pli maldikajn ol tiuj, kiujn ŝpinas la araneo. Ĉi tiuj kvarcaj fadenoj estas fortaj kiel ordinara ŝtalo de egala diametro kaj ilia elasteco estas pli granda, ol tiu de ŝtalo. Ili estas uzataj en sciencaj instrumentoj, tiaj, kiaj mezuras la tiradon de pezeco per malgranda globo pendanta apud granda maso de metalo.

1923 CONGRESS WILL BE HELD IN NUREMBERG.

The last duty of the Fourteenth Congress was to decide where next year's meeting shall be held. It was generally known that representations in favour both of Warsaw and Vienna would be made, but scarcely anyone had an inkling that an invitation would be forthcoming from Nuremberg. However, the proposition from Nuremberg was the first submitted. Then the president of the Polish Esperanto Society explained that, although the First Polish Esperanto Congress had decided to invite the Fifteenth Congress to Warsaw, it was now found that conditions were not favourable. They did not withdraw the invitation, but asked that it should be considered later. S-ro. Fiby, who had been commissioned to advocate the claims of Vienna, had already left on his return journey, so the invitation to Vienna

HAROLD PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Portu ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

was made by deputy. Dr. Privat urged a unanimous acceptance of the invitation to Nuremberg. He reminded those present that the first Esperanto booklets and the first Esperanto periodical, "La Esperantisto," were printed there, and that Nuremberg was the home of the first Esperanto group. Historic associations would not be the only attractions. The town was charming, with interesting towers, old town walls, and beautiful surroundings. The invitation was unanimously accepted, and the president congratulated the German Esperantists and wished them every success. So Esperantists the world over are now looking forward to their next reunion—the fifteenth—in Nuremberg.

"INTERNACIA MONDLITERATURO"

POR LA TUTMONDA ESPERANTISTARO.

Kion ni devas legi?! Estas certe, ke ĉiu, iomete progresinte rilate la lernadon de "nia lingvo", bezonas la legadon de internacia literaturo, ne tradukaĵojn el sia nacia literaturo. Nia principo ja estas: Kun niaj samnacionoj ni parolu la gepatran lingvon, kun alilandanoj Esperanton, la neŭtralan mondhelpingvon! Do, jam pro tio neniu volonte legos la verkojn de sia nacia literaturo Esperantigitajn. Eble li faros tion pro la lingva ekzerkado, pro lingva intereso, sed ne por havigi al si la ĝuon, kiun prezentas la originalo. Estas ankaŭ iomete danĝere, ĉiam legi Esperanto-tradukojn de samnacionoj, ĉar tiamaniere oni ne fariĝos tute lerta, perfekta Esperantisto. kiu scipovas eviti lingvajn naciismojn, tiamaniere oni ne akiros internacian stilon. Multe pli rekomendinda kaj preferinda estas la legado de verkoj, Esperantigitaj per samideanoj el aliaj nacioj. Sur ĉi tiu vojo nia stilo, nia vortfarado pliboniĝos, "nia Esperanto" fariĝos vere internacia. Kaj: legante la verkojn de alinacionoj ni enpenetros en la literaturon, kulturon, kutimojn, movojn, vivon de aliaj popoloj. Tio estas nepre necesa, por ke ne nur ekstere, sed ankaŭ interne fariĝu homoj "homaranecaj," kiuj povas senti kaj pensi kun la homoj de aliaj popoloj.

Dum la Geneve-a konferenco mi jam

publike—kaj konsentite de ĉiuj ĉeestantoj—aludis la necesecon, krei entreprenon, per kiu ni povas ricevi por niaj kursoj, por niaj lernejoj, por niaj propraj liberaj horoj la plej bonajn verkojn de aliaj nacioj, bone Esperantigitajn.

Bedaŭrinde la fame konata firmao Hatchette & Cie. en Paris ne plu eldonas Esperantaĵojn. Des pli salutinda estas la cirkonstanco, ke unu de la plej grandaj germanaj eldonejoj, la firmao Hirt & Sohn en Leipzig, montras grandan intereson por nia movado; ĝi jam eldonis bonajn Esperantaĵojn kaj ĝi jam antaŭ kelkaj monatoj konsentis mian planon, krei specialan fakon por "Internacia Mondliteraturo." Mi proponis jenajn principojn:

1. Oni akceptu nur verkojn, kiuj estas vere valoraj de sur literatura vidpunkto! Ĉu iu verko estas tia, pri tio decidu la samnacionoj mem de la elektota verkisto.

2. Oni komisiu la tradukon de iu ajn verko nur al ano de la sama nacio, al kies literaturo la verko apartenas!

3. Oni zorgu, ke kiel eble plej multaj —se eble ĉiuj civilizitaj—nacioj estu reprezentataj en la entrepreno de "Internacia Mondliteraturo"!

4. Oni komence elektu—por atingi la celon de la 3-a punkto—ne tro longajn verkojn!

5. Oni eldonu en unu volumo nur verkojn de unu aŭtoro kaj nomu la volumon laŭ li, ne laŭ la tradukinto, kio ŝajnas al mi tre malaprobinda kutimo.

6. Oni komence ne entreprenu tro multon, t. e. oni ne traduku ĉiusecajn verkojn, sed—tion mi proponas pro la nuna stato de nia movado—nur beletristikajn verkojn, ekz. novelojn, rakontojn, mallongajn romanojn k. c. Pli malfrue oni ja povas decidi pri la traduko de ekz. ĉiusecaj sciencaj verkoj k. a.—

La firmao Hirt & Sohn komisiis min, kiel direktoron de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko, zorgi pri la efektivigo de la ideo de "Internacio Mondliteraturo" por la tutmonda Esperantistaro.

Mi des pli volonte agos laŭ ĉi tiu komizio, ĉar mi mem jam de longa tempo treege deziris tian entreprenon. Ni celas per ĝi tute alion, ol kelkaj alilandaj samideanoj, kiuj volas disvastigi la literaturon de sia propra lando,

por disvastigi la kulturon de sia lando. Ankaŭ aprobinda entrepreno, sed tute malsama! Ni volas disvastigi la tutmondan kulturon per la literaturo de kiel eble plej multaj landoj. Pro tio mi ĝojus, se mi baldaŭ ricevus respondojn, ĉu samideanoj el ĉiuj negermanaj nacioj volas helpi, por ke ni ricevu el ĉiu popolo kaj ĉiu literaturo valorajn verkojn Esperantigitajn, taŭgajn por nia celo. Kompreneble la firmao laŭdece rekomencos la laboron de la tradukantoj.

Mi petas, ke ĉiuj, kiuj volas partopreni al nia laboro, nepre necesa por la Esperantistaro, anoncu sian nomon kaj samtempe skribu, kion ili volas traduki. Estas plue rekomendinde, ke ili (se ili ne jam estas konataj kiel lertaj tradukistoj kaj Esperanto-stilistoj) poste sendu parton de sia tradukaĵo, laŭ kiu oni povas juĝi pri ilia lerteco; ĉar ni povas akcepti nur bonajn tradukojn. Sed certe en ĉiu nacio troviĝos sufiĉe da tiaj tradukistoj. Ĝis nun ni jam ricevis promesojn de kunlaborantoj el diversaj landoj. Helpu, por ke ni baldaŭ havu vere "internacian" kolekton, kolekton reprezentontan ĉiujn naciojn.

PROFESSOR D-RO. DIETTERLE,

Direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko.

Post multaj klopodoj S-ro. A. Robin fine decidigis "les Petits Bonshommes" akcepti kurson pri Esperanto por iliaj legantoj. "Les Petits Bonshommes" (1 rue Desiree, Paris-20e) estas interesa porinfana revuo semajna, kiu eldoniĝas 10,000-ekzemplere, kaj estas konata tra tuta Francujo. La kurso daŭros dum 2 aŭ 3 monatoj. Kredeble multnombraj estos la junaj francoj, kiuj lernos Esperanton, ĉar la kurso estos kiel eble plej amuza. Fakte ĝi estos ludo, ne studo.

GAZETOJ RICEVITAJ.

AMERIKA ESPERANTISTO, jun., jul.-aŭg.; BULLETIN de S. Francaise P. E.; jun.; ESPERO KATOLIKA, jun., jul.; ESPERO TEOZOFIA, maj.-aŭg.; ESPERANTISTA JUNULARO, jun.-jul.; ESPERANTO FINNLANDO, jun.-jul.; EXPORT ESPERANTIST, jul.; ESPERANTO TRIUMFONTO, n-roj. 91 ĝis 98; FRANCE ESPERANTO, jul.; INTERNACIA KOMERCA REVUO, jul.; KATOLIKA SENTO, nova monata revuo, S. Luca, Corte Scotti, 4568, Venezia, parte Esperante, parte Itale, jul.-aŭg.; LA KONKORDO, jun.; KATALUNA ESPERANTISTO, jun.-jul.; KATOLIKA MONDO, n-ro. 2, KRISTANA ESPERO, mar.-jun.; LA POLICISTO, nova fakjurnalo, Budapesto, 41, poŝtkasto 255, aperas en ĉiuj ses semajnoj, 8 s 4p jare; maj. aŭg.; L'ESPERANTO, jun., jul.-aŭg.; LA PROGRESO, jul.; LA SEMISTO, maj.-jun.; LA VERDA OMBRO, maj.; LA UNUIGITA TUTHOMARO, maj.-jun.; LITOVA STELO, jul.; LE MONDE ESPERANTISTE, maj.-jun.; BULLETIN DE LA SKOLTA ESP. LIGO, jun.; SENNACIECA REVUO, jul., aŭg.-sep.; TERISTO, jun., jul., aŭg.; VERDA UTOPIO, jun.

AL NIAJ SUBTENANTOJ,

Ĝis la 10 oktobro ni ricevis la jenajn sumojn, kun danko:—A. Porter, 4/6; F. Cherrett, 4/6; Nigra Cigna Grupo, £2/2/6; T. G. Goss, 5/; J. M. Dowsett, 5/; A. E. Church, 5/; T. L. Wiltzscheibe, 4/6; H. Byatt, 4/6; E. McKenzie, 4/6.

S-ro. W. Kucernko, Leo Tolstoj 50, Bender Tighma, Besarabia, Roumania, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiu lando.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasia Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne.

By The Imperial Press, Printers, 395 Elizabeth Street, Melbourne.